

La 23-an de majo, ĉirkaŭ kvindek personoj partoprenis en ekskurso al urboj Ripatransone kaj Offida.

Ripatransone, ankaŭ nomata "*Belvedere Picenum*" sidas sur monteto, kiu disigas la torentojn *Menocchia* kaj *Tesino*. Alveninte frumatene, la ekskursantoj atingis la centron de la urbo, kie ili ĝuis la vidon al la Adriatika Maro kaj al la Montoj "*Sibillini*". En la urbo ili malkovris interesajn placojn, stratojn, eĉ stratetojn. Multaj mezepokaj domoj el brikoj beligas la urbon. Eĉ unu domo datiĝas de 1064.

Poste ili iris al **Offida**, kiu situas meze de vinberĝardenoj. En tiu regiono multaj altkvalitaj vinoj ofertiĝas al la vin-amantoj. Tiu vilaĝo naskiĝis en 1205 per la kunmeto de kvar kasteloj.

Promenante en la urbo, sur la sojlo de la domoj eblas vidi puntistinojn prezentantaj siajn artajn produktaĵojn. Tiu tradicio ripetiĝas de patrino al filino dum kvin jarcentoj. Je la memoro de tiuj artistinoj, monumento staras ĉe la enirejo de la urbo.

La kongresanoj vizitis la muzeon de Offida pri arkeologio kaj popolaj tradicioj. Belegaj broditaj vestaĵoj tie pendis en la montrofenestroj. Multaj pavimitaj stratoj kaj stratetoj ebligis eniri en la koron de la urbo kun mezepoka influo.

(raportis Jean Ripoché)

Kompletigo al la **kongresa libro**: sur la paĝo 34 aperas listo de utilaj retejoj. Kongresanino Barbara Pietrzak, kiu ankaŭ reprezentis UEA-an en la kongreso, atentigis pri alia utila kaj aŭskultinda retejo: **www.pola-retradio.org**

Vizitu, aŭskultu kaj ĝuu!

Fotoj pri la kongreso: kelkaj partoprenintoj dissendis kaj enretigis fotojn pri la kongreso. Kelkajn eblas vidi tie:

<http://66ifef2014.over-blog.com/fotoj-de-la-kongreso.html> --- (kongresa retejo)

<http://tef-esperanto.over-blog.com> --- (pluraj ligiloj maldekstre)

<http://ifef.free.fr/IFK2014-SanBenedetto-fotoj.html>

Raportaĵojn viajn pri la kongreso bonvenigas Vito, Romano kaj Gianfranco.



Kongres-bulteno n° 2

66-a IFEF-Kongreso

San Benedetto del Tronto,

17-24ajn de majo 2014

Karaj gekongresintoj,

Jen pliaj informoj kaj raportaĵoj pri la lastmonate okazinta IFEF-kongreso.

Kiom da kongresanoj ? Al la kongreso aliĝis **136 samideanoj el 19 landoj**. Jen la nomoj de lastaj aliĝintoj, kiuj ne aperas en la kongresa libro :

n° 130 Renzo MANTOVAN (IT)

n° 131 Raffaella SAVASTANO (IT)

n° 132 Franco FRONTALI (IT)

n° 133 Wang RUIXIANG (CN)

n° 134 Rosa LO PICCOLO (IT)

n° 135 Tommaso VITELLI (IT)

n° 136 Laura BRAZZABENI (IT)



London la 19-an de majo, la **Provincestro oficiale akceptis** la kongresanojn en la urbodomo de San Benedetto del Tronto.

Vizito de Ascoli Piceno : samtage posttagmeze du aŭtobusoj veturigis kongresanojn al najbara urbo Ascoli Piceno okcidente de San Benedetto. Gvidate de Romano Bolognesi laŭ konsiloj de profesia ĉiĉeronino, la ekskursantoj povis malkovri multajn domojn, pala-cojn, turojn kaj antikvajn preĝejojn. Kvankam de tempo al tempo ilin minacis pluvo, la trarigardoj estis allogaj. Piedirada itinero gvidis ilin al la centro de la urbo *Arringo* kaj per ĉirkaŭa rondirado ili vizitis la preĝejon *Sankta Francesco* kaj poste direktiĝis al la rivero *Tronto* ĝis placo *Ventidio Basso*. Per *strato Solestà* ili atingis romian ponton. Revene laŭ la *strato Soderini*, ili alproksimiĝis al la romia haveno *Gemina*. Multaj monumentaj stratoj de mezepoka stilo montris la regulan romian artan sistemon. Finaj paŝoj kondukis la kongresanojn al katedralo, kies fasado estis farita de la fama *Cola el Amatrice*.

(raportis Jean Ripoché)

La fama regiono "**Marche**": tion povas aserti la partoprenintoj de la tuttaga ekskurso okazinta merkredon 21-an de majo. Ili sinsekve malkovris la urbojn Loreto, Recanati, Castelfidardo kaj la Ŝtatan Tuŝ-Muzeon "**Omero**" en Ancona.

Frumatene aŭtobusoj veturigis ilin plejparte laŭ la marbordo al urbo **Loreto**. La tradicio rakontas ke, en la nokto de la 10-a de decembro 1294 alvenis el Palestino al markia marbordo, fluge transportita de anĝeloj, la Sankta Domo Nazareta, kie la Virgulino Maria ricevis la anoncon de anĝelo.



La kongresanoj alvenis al la Placo de la Madono, vizitis la **katedralon**, kie oni kultis ikonon pri la virgulino, pentritan sur ligno, kiu, pro sia malhela koloro, estigis la tradician kulton al la Nigra Madono. Ene de la katedralo ili malkovris la sanktan domon de Nazareto, kie, laŭ la tradicio, la Virgulino Maria ricevis la Anoncon. El la urbaj monumentoj, inter multaj vidindaĵoj, ili trarigardis la Fontanon "Majora" kaj la kastelajn muregojn.

Sekva vizito okazis en urbo **Recanati**, kie la ekskursantoj malkovris la Leopardian etoson. Tiu malnova urbeto montras multajn monumentojn, mallarĝajn stratetojn kaj ĉefe la Palacon de la fama poeto Giacomo Leopardi kaj la preĝejon Sankta Aŭgusteno.

Post refortiga paŭzo en bona restoracio, la kongresanoj daŭrigis la vojon per vizito de **Castelfidardo**. En tiu urbo situanta sur monteto ili aliris la ĉefkernon de la urbo nomata *Placo de la Respubliko*. Fronte rigardas la Urbodomo kaj la kanonika preĝejo de Sankta Stefano kun apuda kriptoj. Ankaŭ notindas la Monumento de Markio, starigita memore al la Batalo de Castelfidardo, verko de la venecia skulptisto *Vito Pardo*, la Muzeo de la nacia Relevo kaj la ostombejo. La 18-an de septembro 1860, la Piedmontanaj trupoj de Generalo *Enrico Cialdini* venkobatis la papajn trupojn en la batalo de Castelfidardo.

Tiu urbo estas konata ankaŭ pro la tradicia fabrikado de nekutima muzika instrumento, t.e. la **akordiono**, al kiu oni dediĉis muzeon kaj monumenton. Pluraj centoj da akordiojoj, ĉu diatonaj, ĉu kromataj, kuŝas sur la bretoj de ŝrankoj. La muzeo montras ne nur la historion de la produktado de muzika instrumento, sed ankaŭ omaĝas la multajn metiistojn kaj industriajn entreprenistojn.



La kolekto konsistas el ĉ. 360 pecoj, ĉiuj malsamaj, kaj estas unu el la plej vizitataj muzeoj en la Regiono Markio.

Fine de la vizito, la kongresanojn ĝuigis akordionaj melodioj interpretitaj de gaja spertulo. Kelkaj vizitantoj akompanis lin kantante aŭ dancante.



Sekva kaj lasta vizito okazis en la **Ŝtata Tuŝ-Muzeo "Omero" en Ancona**, unu el la malmultaj tuŝmuzeoj en la mondo, kreitaj por antaŭenigi la integriĝon de la homoj kun vidimigoj. Tiu muzeo situas en la antikva Lazareto de *Ancona*, kie situas ankaŭ loko por lerni pri la arto tra la mirinda perspektivo de la manoj. La riĉa kolekto inkludas tuŝblajn modelojn de famaj konstruaĵoj (la Partenono, la torina granda konstruaĵo, "*Mole*", de Vanvitelli), kopiojn kaj muldilojn de famaj skulptaĵoj ("*Pietà*" de Mikelaĝelo, la itala *Venuso* de Canova, ktp.), tre gravajn antikvaĵojn kaj originalajn verkojn de nuntempaj artistoj.

(raportis *Jean Ripoché*)

En normalaj muzeoj, ofte legeblas la atentigo "*Rigardu, ne tuŝu*". En la tuŝmuzeo de Ancona, tute male: "*Tuŝu...*"! Ja ĉe la enirejo, tiuj, kiuj deziras, povas surmeti nigran rubandon kaj blinde palp-malkovri la prezentatajn artaĵojn.

Dumkongrese **merkrede vespere** okazis subĉiela muzika vespero, dum kiu la spektantoj povis ne nur aŭskulti belajn muzikaĵojn, sed ankaŭ ĝui mirindan italan kanton "*O sole mio*", kiun per belega voĉo kantis ĉina kongresano!

Du pliajn kantojn li prezentis ankaŭ dum la kongresa fermo. Por ĝu-aŭskulti pliajn, necesos partopreni en la venont-jara IFEF-kongreso en Ĉinio, asertis niaj ĉinaj amikoj-kolegoj!



Dum la tuta kongreso ĉetoble abundis treege bongustaj manĝaĵoj. Pri tio ŝajne plene konsentas Martá kaj István! Eĉ eblis trinki Esperanto-vinon!